# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

J A R K O L E K T O

5 N° 2 febr. 1985

J A A R G A N G

## A T E N T I N D A Ĵ O J

- venonta estrarkunsido : sabaton 2-an de marto en Esperantodomo, A'peno

venonta ĝenerala jarkunsido, al kiu ĉiu estas kore invitata, : sabaton 16-an de marto 1985, ekde 13.30 h. en Esperantodomo, Frankrijklei 140, Antwerpen, sekvota de agrabla kunestado, al kiu vi tamen antaŭmendu ĝis 15-a de marto. Partopreno : BF 200,-
La ricevantoj de ĉi bulteno, bonvolu averti kaj inviti la aliajn membrojn de sia grupo. Dankon.

- je la 17-a de februaro : SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO
Ĉiuj al L E U V E N !!!

- ankaŭ ne forgesu, bonvolu, vian kunlaboron kun GAZETARA SERVO.
T R E G R A V E !

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTOLIGO
Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
Telefono 03/234 34 00
Jarabono : BF 150,- Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43

---

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto : | Ivo DURWAEL, Paul Gilsonlaan 5<br>2520 EDEGEM | 03/440 30 92 |
| Sekretario : | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 06 |
| Financoj : | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM | 053/77 44 97 |
| | Paul PEERAERTS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Informado : | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 62 66 |
| Intergrupa agado : | Hilde VAN INGELGEM, Arbeidstraat 21<br>9300 AALST | 053/70 50 11 |
| | Trees DOOMS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Junularo : | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 24 |
| Kadrokursoj : | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN | |
| Literaturo/eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN | |
| Gazetara ŝervo : | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b. 4, 1500 HALLE | 02/360 17 22 |
| Sciencoj : | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 49 |

Provincaj respondeculoj :

| | | |
|---|---|---|
| Brabanto : | M. Th. HENQUINEZ<br>Lipsestraat 166, 2991 TILDONK | 016/23 61 90 |
| Limburgo : | Guido SCHROEYERS<br>Helzoldstraat 113, 3558 HELCHTEREN | 011/53 64 10 |
| Okc. Flandrujo : | vakas | |

---



BIBLIOGRAFIO DE ESPERANTO

Prepare al la jubileo de Esperanto en 1987, Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia intencas eldoni bibliografian kajeron pri ĉiu kiu aperis pri Esperanto, nome : libroj, revuoj, artikoloj, broŝuroj k.s.

La unua kajero aperos aŭtune de 1985 kaj entenos la aperaĵojn de 1984.

Por kiel eble plej bone sukcesi, CDELI petas la apogon de eldonistoj, ĵurnalistoj (gazetar-prizorgantoj), sciencistoj, produktantoj de kasedoj kaj diskoj, organizantoj de kongresoj, renkontiĝoj kaj kursoj, klub- kaj grup-gvidantoj ktp.


Bonvole sendi viajn kontribuaĵojn en formo de specimena ekzemplero de ĉio aperinta en kaj pri Esperanto al :

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo
Strato Progres 33
CH-2300 LA CHAUX-DE-FONDS, Svislando.

Dankon pro via kunlaboro.

---

Responde al nia gratulletero al Cesar Vanbiervliet, ni ricevis karton kun la ĉi suba teksto :


Al la Estraro de Fel.
Cesar VANBIERVLIET - RYSMAN
en kinderen
Okaze de la 80a datreveno de mia naskiĝo
mi agrable estis surprizita pro la ricevo de viaj
bondeziroj kaj de la grandega Statutkandelo
kaj librokupono.
Mi ege esperas ke la Kandelo ankoraŭ dum
multaj jaroj povos lumigi mian fervoron por
disvastigi mian [illegible] koncerne la
Kortrijka Esperanto Fondaĵo
Al ĉiuj elkoran dankon
Oudenaardsesteenweg 158 8500 KORTRIJK

## P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 2-a de februaro 1985 en Antverpeno.

Ĉeestas : Erik D'Hondt (ED), Ivo Durwael (ID), Gerd Jacques (GJ) - posttagmeze, Paul Peeraerts (PP), Hilde Van Ingelgem-Vandriessche (HVI) kaj Jan Bovendeerd (JB).

Prezidas : ID. Protokolas JB.

----------

1. La protokolo pri la kunsido de 05 01 1985 estas tralegata kaj kompletigata per jenaj rimarkoj :

1.1. punkto 4.2.
HVI sendos al Herman Deceuninck liston de kunlaborpromesintoj en la Gazetara Servo.
Ŝi petas al ĉiu havigi al ŝi tiom, kiom eble da informoj tiurilate.

1.2. Herman Deceuninck proponis publikigi en ESPERANTO PANORAMA la plej gravajn novaĵojn pri Esperanto.

1.3. Herman volus ankaŭ akiri le verkon "Doelmatig publiciteit maken" (Laŭcela publicado).
Aprobite.

1.4. punkto 8.2.
JB atentigas ke ĝenerale la jar- kaj morala raportoj de la sekretario venas post la ceteraj raportoj, por eviti eventualajn duoblaĵojn kaj antaŭ la prezidanta konkludo.
Do, la sinsekvo de la ĝenerala jarkunsido estu :
8.5. sekretaria raporto
8.6. prezidanta konkludo
8.7. Eksigo de la estraro
8.8. Elekto de nova estraro
8.9. Instalado de la nova estraro
8.10 Fina vorto de la prezidanto kaj fermo de la kunsido

Por la cetero, la protokolo estas aprobita.

2. Bibliotekoj.

La ministerio eldonis liston de publikaj bibliotekoj.
ED mendos ĝin kaj sendos al ili proponon pri aĉetindaj libroj.



3.1. ID raportas :
Herman Deceuninck proponis donaci al BRT diskon por ĝia programo "Vragen staat vrij" (Petoj permesataj) kaj poste publikigi en Esperanto Panorama kiu(j) disko(j) troviĝas ĉe BRT kaj povas esti mendataj por disaŭdigo.

3.2. Rilate al "Test 5000", Herman havas similan proponon, nome lanĉi kampanjon, laŭ kiu 500 ĉinoj volas korepondi kun Flandroj, substrekante ke tiuj ĉinoj konas jes Esperanton kaj volas korespondi en tiu lingvo. Interesitoj povos lerni la lingvon, eĉ senpage (kiel en Test 5000).
Kompreneble, antaŭe oni devos kontaktiĝi kun Ĉina Esperanto-organizo por trovi tiujn pretajn 500 korespondemulojn.
Same kompreneble estas, ne nur limigi sin al Ĉinio.
PP proponas atendi ĝis kiam la "Test 5000"-kampanjo iom malpliiĝas, ĉar nun la Centro estas tro ŝarĝita per la nun kurantaj kampanjoj kaj la lasta televid-elsendo.

4. SUBVENCI-EBLECOJ

4.1. ID raportas ke li havis kontakton kun la direktoro de la Provinca Servo Antverpena.
Dum tiu interparolado li faris malkovrojn pri pli favoraj subvenci-eblecoj.
ID proponas meti detalojn en la "Manlibro por Aktivuloj".

4.2. La reprezentado en la Provinca Kultur-konsilantaro ŝajnas al ID sensenca por Esperanto.
La nura kialo ja ankaŭ estas nur "politiko de ĉeesto".

5. FEL-Kongreso 1986

Sin proponas la Bruĝa Esperanto-grupo "PACO KAJ JUSTECO" por organizi la kongreson en 1986 en Blankenberge.

La estraro principe akceptas - fakte ĝojas pro la spontanea propono - sed, kompreneble povos decidi nur post ricevo de
- buĝeto (en ekvilibro)
- kongresa regularo (kiu povos esti kunmetita kunlabore kun Marc Van de Bempt rilate al la organizado)
kaj kondiĉe ke ĝi estu regule informita rilate al la evoluo de la preparlobaroj.

ID kaj HVI priparolos la aferon okaze de sia vizito al Bruĝo.

6. ELDON-AGADO

6.1. Nia reklamanonco pri "Jaĥto veturas for ... " de Deck Dorval restis ĝis nun sen-reaga.

6.2. C. Declerck ricevis novan tekston por prijuĝo.

6.3. ID ricevis trian proponon de S-ro Van Dooren. Nun temas pri teatrajo "Kia Miksajo" en la Nederlanda sed temanta pri Esperanto. La teksto estos ankaŭ submetita al C. Declerck por prijuĝo.

6.4. Kolokvaj tekstoj.
JB kontaktiĝis kun la prezidanto kaj sekretario de KLUBO 100, resp. Marc Demonty kaj André Mertens-Goossens kaj principe interkonsentis ke la tekstoj de la kolokvoj (Aalst kaj Antverpeno) estus senpage haveblaj de la interesitoj, sed kontraŭ kompenso de la sendokostoj. Do, tiuj kiuj pretas kunporti ilin el la Esperanto Centro, ricevos ilin senpage. Tiuj kiuj volas ĝin ricevi sendite per la poŝto, havigu al la centro unu poŝtmarko 12-franka aŭ, se eksterlanden, unu IRK.

6.5. ED proponas reklami la "KROKODIL"-afiŝojn kiuj estis uzataj en la kongreso en Aalst.
ID proponas al la prezidanto de La Verda Stelo afiŝi ilin en la klubejo.

7. INFORMADO-AGADO

7.1. La Esperanto-Centro ankoraŭ ne estas sufiĉe ekipita, nek home, nek finance, por taŭge alfronti la sekvojn de kampanjoj, almenaŭ ne la nun kurantaj.
Ekzemple, post la televid-elsendo de la 22-a de januaro, envenis pli ol 400 informpetoj en kelkaj tagoj. Jen situacio preskaŭ ne eltenebla. Dume pludaŭras ankoraŭ la kampanjo "Test 5000".

7.2.1. Test 5000 - ESPERANTO PROGRAMITA (raportas GJ.)

730 personoj mendis la unuan libreton de ESPERANTO PROGRAMITA
El ili : 135 pagis la unuan parton
65 " " duan "
37 " " trian "
29 " " kvaran "
12 finis la kurson

53 ne resendis kaj ankaŭ ne pagis la menditan materialon.

7.2.2. Laŭ la korektanto (S-ino Henny Jacques) mankas personaj kontaktoj kun la kursanoj. Normale ne sufiĉas nur korekti, sed necesas ankaŭ sendi klarigajn leterojn. Tio tamen estas tro da laboro por nur unu persono, alivorte necesas povi disponi pri pli da korektantoj.



Proponite estas peti de la korektantoj de la koresponda kurso kunlabori en tiu-ĉi programo.

7.2.3. La Korektotaj laboroj normale alvenas en la Centro kaj estas ankaŭ resenditaj de el la Centro. Tamen, ĝenerale S-ino Jacques resendas ilin rekte.

7.2.4. ID sin demandas ĉu la operacio estas finance eltenebla kaj ĉu estas ekonomie interesa fari novajn membrojn kaj kateni ilin.

Plie li raportas ke LA VERDA STELO organizos konversacian semajnfinon antaŭ longe.

7.3. Laŭ PP la fruktoj de la ĝis nun farita laboro devas ankoraŭ evidentiĝi.

7.4. ID miras ĉu estus interese kaj necese sendi adresojn al la grupoj. Ekz. membroj, kiuj pagas rekte al FEL. Eblas ja ke tiuj personoj nepre ne volas aparteni al iu grupo kaj tial pagas al FEL.
Li proponas pridiskuti tiun temon en la ĝenerala jarkunsido.

7.5. Informpetoj.

Ĉu estas eble respondi al ĉiuj informpetoj kiuj alvenas en la Centro. Laŭ PP, por tio ni ne estas preparitaj.

Aliflanke, ĉu ni povas don(ac)adi informmaterialon, senpage, do? Principe jes, sed ne sisteme.

Laŭ PP ni devus disponi pri listo de la disponigebla materialo. Nun ekzistas nederlandlingvaj broŝuroj jenaj :

- Culturele Waarde van het Esperanto - E. Symoens
- Propedeutische waarde van het Esperanto - Franck
- Esperanto, je vraagt maar - Cl. Piron
- Esperanto, een Europese of Aziatische Taal - Cl. Piron

Baldaŭ aperos nederlandlingve "L'Esperanto" de Janton.

PP disponas ankaŭ verko de I. Lapenna : "Fundamentele Feiten van het Esperanto". Li pretas ĝin priekzameni por adaptigo kaj ĝisdatigo.

7.6. Ankaŭ estas demando pri diplomoj kaj / aŭ atestiloj.

7.6.1. JB atentigas ke kadre de Klubo 100 ekzistas - almenaŭ la intenco estis krei ĝin - ekzamenkomisiono baz- kaj mez-grada por akiri UEA-atestilon.

7.6.2. Ŝajnas tamen, ke la peto venis el grupo, kiu ne tuj bezonas UEA-diplomon sed simplan atestilon ke la interesitoj "sekvis kurson".

7.6.3. Proponite estas uzi la atestilojn de ESPERANTO PROGRAMITA, sed adaptitaj, kompreneble.

8. ESPERANTO 2000 faris laborplanon por la jubilea jaro 1987 kaj volas kadrigi ĝin en tiun de FEL.

   HVI telefonos al Marc Van den Bempt por aranĝi partoprenon en ilia kunveno pri tiu temo.

9. Intergrupa agado.

   HVI proponas lasi la du Bruĝajn grupojn, kiuj finfine ne sukcesis kunmeti la fortojn en unu sola grupo, trankvile labori ĉiu sur sia tereno kaj atendi la evoluon.
   Aprobite.

10. ID dubas ĉu la kunventekniko, adoptita depost lia prezidantiĝo, ren kontas la dezirojn de ĉiuj kunsidantoj.
    Ĉu necesas ion ŝanĝi ?

    Ĉiu esprimas sian kontenton kaj ne deziras ion ŝanĝi.

11. Buĝeto 1985

    La buĝeto estas antaŭmetita kaj detale pridiskutata.
    La klariĝojn donas PP kaj ED.

12. Subvenci-dosiero por la ŝtato

    La necesaj dokumentoj estas subskribitaj de la respondeculoj kaj JB ricevas la komision zorgi pri la jar-raporto kaj pri la ĝustatempa sendado al la ministeriaj servoj.

Fino : 16.30 h.

JB

---